

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 6, nummer 5 (35) januari-februari 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 6, n-ro 5 (35): januaro-februaro 2014
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

*Denove unu jaro estas pasinta, kaj la nova
jaro anoncas sin graveda je gravegaj inter-
naciaj financaj kaj ekonomiaj problemoj.*

*Espereble la nova jaro 2014 proksimigos nin
al la solvo de tiuj problemoj.*

*Al ĉiuj niaj gelegantoj kaj iliaj familianoj, mi
deziras prosperan kaj feliĉan jaron kaj agra-
blan kunlaboron en iliaj respektivaj kluboj kaj
kunvenoj. Partopreno en klubo vivo kaj espe-
rantaj aranĝoj estas esenca por la disvastigo
de Esperanto en la mondo. Esperanto estas
efektive la lingvo de la espero : espero por ĉiuj
teranoj je vivo digna je homa, t.e. egalaj rajtoj
por ĉiuj homoj, ne nur ekonomie kaj sociale, sed
ankaŭ lingve, kio ne estas malpli grava. Sub-
premo de popolo ofte komenciĝas per lingva
subpremo. En tiu rilato Esperanto tre gravas.
Nelson Mandela, la ĵus mortinta prezidanto de
Sud-Afriko, donis gravan lecionon al ĉiuj poli-
tikaj gvidantoj en la mondo, forigante "apart-
heid" (la plej fame konata nederlanda vorto en
la mondo) el sia lando. Vera demokratia signi-
fas: egalaj rajtoj kaj devoj por ĉiuj civitanoj.
Tial trudado de iu ajn lingvo al ĉiuj mondanoj
per politika kaj ekonomia premo estas abome-
ninda kaj kondamninda, ĉar, limigante la libe-
recon de la aliaj popoloj uzi sian propran
lingvon, ĝi forprenas al ili ilian plej naturan
rimedon defendi sin. Fakte la angla estas
nuntempe la sola lingvo uzata dum internaciaj
kunvenoj, kiu donas al la denaskaj angleparol-
antoj kolosan avantaĝon kaj superpezon dum
internaciaj traktadoj. Tio estas granda mal-
justeco kontraŭ la ne-angleparolantaj popoloj,
kiuj neniam kapablas samnivele paroli la
anglan. Lingva egalrajteco estas garantiata
nur per politike kaj ekonomie neŭtrala lingvo.
La sola tia nuna lingvo estas Esperanto.*

Pieter Jan Doumen

Plua historio de Esperanto (8)

Verdere geschiedenis van het Esperanto (8)

14. Esperanto inter la katolikoj

Kiel la laboristoj, tiel ankaŭ la katolikoj apartigis sin de la ĝenerala, neŭtrala Esperantomovado. La iniciatinto estis la franca pastro Emile Peltier, kiu en 1903 komencis eldoni la gazeton "Espero Katolika".

En 1910 okazis la unua Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Parizo. Tie fondiĝis la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kies celo estis servi al la interesoj de la katolikismo kaj de la katolikoj per Esperanto. Do ankaŭ ĝi laboris ĉefe *per* kaj ne *por* Esperanto. Poste okazis regule ĉiujare specialaj katolikaj Esperanto-kongresoj. En kelkaj katolikaj landoj ekzistas ankaŭ landa katolika esperantista asocio flanke de la neŭtrala kaj la laborista.



La Universala Kongreso de Majnco en 1958

15. Fakaj Esperanto-organizaĵoj

Dum la esperantistaj kongresoj renkontiĝis ofte diverslandaj samfakuloj por preparoli aferojn de komuna intereso, kaj tiaj fakaj kunsidoj baldaŭ fariĝis regulaj programeroj en la kongresaj programoj, kies celo estas disvastigi Esperanton inter la fakuloj de la koncerna fako kaj utiligi Esperanton en la faka laboro. Kelkaj el ĉi tiuj fakaj organizaĵoj eldonas proprajn gazetojn. Kelkaj havas ankaŭ naciajn sekciojn en diversaj landoj. La plej gravaj fakaj organizaĵoj estas la jenaj:

La Esperantaj kuracistoj unuiĝis en la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), kiu eldonas la "Internacian Medicinan Revuon".

La Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE) estas la organizaĵo de Esperante parolantaj geinstruistoj, kaj ĝia organo estas la "Internacia Pedagogia Revuo".

La esperantistoj ĉe la poŝto kaj la telegrafo havas sian propran ligan, nomatan Internacia Ligo de Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-

Oficistaro (ILEPTO), kies organo estas “Interligo de l’PTT”.

En la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) unuiĝas la esperantistaj sciencistoj kaj inĝenieroj. Ĝi eldonis antaŭ la dua mondmilito la “Bultenon de ISAE”.

Ankaŭ la Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj, la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj la Sennacieca Asocio Tutmonda devas esti kalkulataj inter la fakaj organizaĵoj.

16. La Esperantaj gazetaraj kaj literaturaj

En Esperanto aperadas multaj regulaj periodaĵoj aŭ gazetoj. La plej multaj landaj asocioj havas sian propran gazeton. La plej konataj estas “The British Esperantist”, la Franca, la Nederlanda kaj la Belga Esperantisto, “Svenska Esperantisto-Tidningen”, la Norvega “Esperanto-bladet”. La plej multaj el tiuj gazetoj estas presataj parte en la nacia lingvo, parte en Esperanto, kaj servas samtempe por propagando kaj kiel ligilo inter la esperantistoj de la lando per informado, raportado kaj ekzercado de la membroj. En kelkaj landoj laborista aŭ katolika movado eldonas propran gazeton flanke de la neŭtrala.

Flanke de tiuj gazetoj ekzistas ankaŭ fakaj gazetoj, plej ofte organoj de fakaj asocioj, kaj kelkaj internaciaj gazetoj kun pli ĝenerala enhavo, kiu havas siajn abonantojn en la tuta mondo.

Ĝis la fondo de I.E.L. gravan rolon ludis la monata organo de U.E.A. “Esperanto”.

En 1920 Teo Jung fondis en Kolonjo la ĉiusemajnan gazeton “Esperanto Triumfanta”, kiu de 1925 ekhavas la nomon “Heroldo de Esperanto”. Ĝi ĉiam aperadis tre regule kaj estis la plej grava fonto de Esperantaj novaĵoj. Pro la politikaj cirkonstancoj en Germanujo ĝi devis translokiĝi al Hago, kie ĝi daŭre aperadis ĝis la militeksplodo.

Ekde la fondiĝo de I.E.L. “Heroldo de Esperanto” kaj ĝia monata eldono “Esperanto Internacia” estis ties oficialaj organoj. Dum la lasta milito nur la lasta aperadis, kaj en 1947 ĝi kunfandiĝis kun “Esperanto” sub tiu lasta nomo. Post la milito ankaŭ “Heroldo de Esperanto” reaperis, provizore duonmonate.

Tre konata kaj ŝatata gazeto estas ankaŭ “La Praktiko”, eldonata ĉiumonate de la Internacia Instituto de Esperanto

Antaŭ la unua milito la firmao Hachette en Parizo eldonis literaturan gazeton “La Revuo”,



kiu estis tre grava precipe pro la regula kunlaborado de d-ro Zamenhof. En ĝi aperis multaj el liaj tradukaĵoj, kiuj poste estis eldonataj en formo de libroj. Inter la du mondmilitoj la plej grava literatura gazeto estis “Literatura Mondo”, eldonata en Budapeŝto sub redaktado de Kalocsay. Ĝi nun reaperis. “Literatura Mondo” havis ĝis la lasta milito ankaŭ la plej gravan Esperanto-eldonejon, kiu eldonis multajn literaturajojn. Ĝia plej grava eldonaĵo estis eble la “Enciklopedio de Esperanto” en du volumoj.

Jam ekzistas en Esperanto relative granda literaturo. Ĝi konsistas parte el tradukitaj verkoj de nacilingvaj verkistoj, parte en originalaj verkoj de esperantistaj aŭtoroj, inkluzive de gramatikoj kaj lingvaj traktadoj. La Esperanta literaturo povas jam konkuri kun tiu de malgranda nacio.

La tute unua originala romano en Esperanto estis la duvoluma romano “Ĉu li?” de la franca d-ro Vallienne, kiu skribis ĝin en la komenca periodo de Esperanto, kiam apenaŭ ekzistis vortaroj kaj lingvaj studoj. Ĝi estis stile revizita de Kolomano Kalocay.

La ĉefa celo de la tradukita literaturo estas prezenti la trezorojn de la nacia literaturo al la tutmonda publiko. Jam Zamenhof tradukis kelkajn gravajn literaturajn verkojn, kaj sekvis lin multaj lertaj tradukistoj. Sed ankaŭ diversaj malbonaj tradukoj bedaŭrinde aperis. Ĝenerale tradukado el lingvo fremda montriĝis malbona.

La plej gravaj verkoj de Zamenhof estas la jenaj: Hamleto (de Shakespeare), *Georgo Dandin* (de Molière), *Ifigenio en Taŭrido* (de Goethe), *La Rabistoj* (de Schiller), *La Revi-zoro* (de Gogol) kaj la *Fabeloj* (de Anderson). Li tradukis ankaŭ la Novan Testamenton el la greka originala, tiel ke en 1926 la tuta Biblio estis eldonita.

Aliaj bonegaj tradukistoj el la unua tempo estas Kazimierz Bein (Kabe), kiu estas vaste konata pro sia flua kaj bela stilo, kaj kies plej konata verko estas la traduko el la pola lingvo de la romano *La Faraono* (de Prus). Antoni Grabowski tradukis la ĉefverkon de la pola literaturo, la epopeon *Sinjoro Tadeo* (de Adam Mickiewicz).

Iom post iom aperadis tradukoj de diversspecaj verkoj el multaj lingvoj. Ĉi tie ni mencias nur kelkajn el la plej konataj.

El la angla : de Shakespeare: *Makbeto* (trad. Lambert), *La Venecia Komercisto* (Wackrill), *Songô de Somermezo* (Briggs) ; de Munthe: *Romano de San Michele* (Weleminsky)

El la franca: de Molière: *La Avarulo* (Meyer), de Beaumarchais: *La Barbiro de Sevilla* (Meyer)

El la germana: de Goethe: *Faust* (Barthelmess), *Hermano kaj Dorothea* (Küster) ; de Lessing: *Natan, la Saĝulo* (Minor), de Remarque: *En Okcidento nenio nova kaj La vojo returne*.

El la greka : de Homero : *Odusseia* (Manders)

El la hungara : de Madách : *La tragedio de l'homo* (Kalocsay)

El la itala : de Dante: *Infero* (Kalocsay)

El la latina : de Vergilius: *Eneido* (Vallienne)

El la nederlanda : de van Eeden: *La malgranda Johano*

El la Norvega: de Bjørnson: *Gaja Knabo* (Liv Sandberg kaj D. Johansen), de Hamsun: *Victoria* (Rygg)

El la pola: de Sienkiewicz: *Quo Vadis?* (Stellan Engholm), de Orzeszko: *Marta* (d-ro Zamenhof), de Mickiewicz: *Sinjoro Tadeo* (Grabowski)

El la sveda : de Selma Lagerlöf: *Gösta Berling* (Stellan Engholm), de Andrée: *Per balono al la Poluso* (Stellan Engholm).

Laŭ Stöp-Bowitz kaj Isbrücker

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Aŭstrio – 2-a libro pri elektromagneta indukto

Antaŭ du jaroj en la Esperanto-klubo Sudtirolo s-ro Walter Bernard komencis verki bazan kurson pri fiziko por mezlernejanoj en flua Esperanto kaj bone legebla stilo. Post unu laborjaro, antaŭ unu jaro, aperis la unua libro kun la sekvaj ĉapitroj: Ĝeneralaj fundamentoj / Kelkaj bazaj grandoj / Transmisio de forto en fluido / Premo, volumeno, temperaturo /

Laboro, energio, povumo / Elektra cirkvito / Energitransformoj.

La laboro ne haltis, kaj post denove unujara laboro antaŭnelonge li finis la verkadon ankaŭ de la dua volumo :

- Statika ekvilibro / tordomomento / mekanika ekvilibro / masocentro

- Movo kaj forto / rapido kaj akcelo / libera falo / movenergio / unuforma cirkla movo

- Elektromagneta forto / magneta kampo / elektra kurento en magneta kampo / elektraj motoroj

- Magneta kampo de bobeno / magneta permeablo / forto aganta al moviĝanta ŝargo / Lorenc-forto

- Elektromagneta indukto / elektromagneta indukto kaj magneta flukso / indukto kaj energio / generatoroj / transformilo

La nun aperinta volumo estas 66-paĝa, enhavas 206 figurojn kaj ankaŭ temvortan indeksan. Ambaŭ volumoj estas elŝuteblaj en la formatoj pdf kaj odt el la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, ĉe www.eventoj.hu aŭ rekte ĉe la klubo Sudtirolo. La 1-a volumo : http://esperantosudtirolo.files.wordpress.com/2013/07/1_fiziklibro.pdf. La 2-a volumo: <http://esperantosudtirolo.files.wordpress.com/2013/11/2-fiziklibro.Pdf>.

Por sciigi al li viajn opinion kaj eventualajn erarkorektojn, bonvolu kontakti la aŭtoron ĉe esperantosudtirolo@gmail.com.

Szilvási Lázlo, Hungario

Japanio – *Etsuo Miyoshi ricevas ordenon* –

La 12-an de novembro en la Imperiestra Palaco en Tokio la japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto, Etsuo Miyoshi, ricevis la *Ordenon de la Leviĝanta Suno*. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la t.n. bastonvalizo *Walkin' Bag*, kiu helpas handikapulojn moviĝi ien ajn dum promenado, vojaĝo, komercado, eĉ hejme.





Etsuo Miyoshi mem rakontis pri la evento :
 “Ĉirkaŭ unu mil ordenricevontoj estis en la granda halo. La Imperiestro gratulparolis. Poste li promene sin direktis rekte al mi. En mia koro regis konfuzo. Mi ne komprenis, kio okazas. Li afable informiĝis pro mia sano. Mi dankis lin pro lia komplezo, kaj li kliniĝis. Sekve la Imperiestro ĉirkaŭiris, salutante ĉiujn.

“ Post mia naskiĝo mi kaptis poliomjeliton. Infanoj primokis min, amikinoj foriris de mi ... Malfacilis por mi promeni, kaj nun mi batalas kontraŭ postpoliomjelito. Tiaj premoj trejniĝis min persisti en la kreado, surmerkato kaj manaĝerado de ĉio ajn. Tiel mi povis transiri Rubikonon.

“Retrorigardante mian vivon, mi konstatas, ke Dio benis min. Mia malsano utilis por helpi aliajn suferantojn kaj krei paradizon.

“Koran dankon pro via subteno kaj komprenemo por mia agado en Oomoto, Esperantujo kaj komercado”.

El la Balta Ondo

Brazilo – Bona Espero invitas vin –

Ludoviko Zamenhof, kiu pasigis multan tempon de sia vivo ĉe la lumo de kandeloj, vekigis sub la ruĝa ĉielo de matena krepusko. La suno, rapide leviĝante, malfermas antaŭ liaj okuloj la mirindan pejzaĝon de la brazila savano, la virgan naturon en 360 gradoj da horizonto. La kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof rigardas el sia monumento, unika en la mondo, rekte al la majesta Monto Baleno, videble detale en la kristale pura aero. Ĝi ne ŝajnas altega, malgraŭ sia alteco de preskaŭ 1600 m, ĉar Bona Espero situas je 1300 m super la marnivelo. Sed sur la 14-a paralelo de la suda hemisfero. Jen la sekreto de ĝia milda klimato, al kiu la tuta regiono ŝuldas sian nomon ‘alta Paradizo’.

Ĉiumatene mi kutimas saluti la majstron kaj tuj kuras al la lago por gimnastiki kaj naĝi. La lago ricevas sian akvon el abunda fonto. Ĝi estas pumpata supren al la sidejo de Bona Espero per la antikva metodo sen uzo de energio. Tiu kurioza vidindaĵo estas nomata “ŝafofrapo”. De la lago mi rekuras al la manĝejo, alarmite de sonorilo. Ĝi sonas kvarfoje tage : je la 8-a, la 12-a, la 15-a kaj la 19-a horoj. La menuo estas kutime vegetara kaj bazas sin sur la propra, centprocente ekologia legomejo, kiu funkcias la tutan tagon. Sed ne ekzistas malpermeso pri viando. Oni povas bonguste viandumi en restoracioj de la proksime urbeto Ala Paraiso.

Laŭvole kaj daŭre ĉiu rajtas kompletigi sian menuon per fruktoj, plukeblaj rekte de la arboj. Oranĝoj, citronoj, bananoj estas fruktoj konstantaj, ili aperas laŭ siaj natursezonoj : ĵabutikaboj, pitangoj, moruoj, guaranoj, avokadoj, gujavo, gravioloj ktp. Gigantaj jakvoj kaj bongustegaj mangoj komencis maturiĝi en decembro. Tiu monato esta aparte interesa. Tiam la savano transiras decidinte de la seka sezono al la pluvo. Interesa observokampo por naturamantoj. Renaskiĝas la indiĝena flaŭro, kiu dum la tuta jaruono transvivis sen eĉ unu guto da pluvo.

Vekas min bruego de... Ne tiu de aŭtomobiloj, sed de birdoj, vekigintaj pli frue. Amaso da etaj kolibroj, kriemaj papagoj, grandbekaj tukanoj kaj aliaj birdoj, sennomaj por mi, ignoranto pri ornitologio. La rapide subiranta suno farbas la tutan ĉielon per fascina spektaklo de multkolora, abstrakta pentroarto. Tiam mi pensas, ke la belo de nia naturo estas vere sentebla, kiam oni povas dividi ĝin kun aliaj homoj. Kaj mi aŭdas : “Do dividu ĝin kun aliaj! Venigu esperantistojn ne plu por volontule labori, sed por ripozi en mirinde bela naturo.” Tion diras Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj jam preskaŭ 40 jarojn voluntulas en Bona Espero, senlace kaj senenue.

Bona Espero eniras fazon de restrukturiĝo. Dum la pasintaj 55 jaroj ĝia ĉefa celo estis edukado de infanoj kondamnitaj al analfabeteo. Dume okazis en Brazilo granda progreso sur la kampo de edukado. Tio ebligas al Bona Espero turni sian atenton al aliaj statutaj celoj. Venis infanoj, ĉar sen ili ĝi ne estas imagebla. Sed oni prenas malgrandulojn de 5 ĝis 8 jaroj, kiuj estas pli efike edukeblaj. Same neimagebla estas Bona Espero sen esperantistoj, sed nun oni ne devas inviti volontulojn nur por

longa restado, sed ankaŭ ĉiujn aliajn, kiuj volas fari mallongan viziton.

La nova celo estas, ke Bona Espero fariĝu vivanta peco de Esperantujo. En la tuta mondo ne ekzistas simila fenomeno. Jen la proprietaĵo de la Esperanto-movado leĝe konfirmita, kun surfaĉo de 10 kvadrataj kilometroj, kompleta infrastrukturo kaj moderne ekipitaj konstruaĵoj en belega naturo. Esperantistoj venu en decembro por ripozi en tiu mistera mondangulo kaj festi Kristnaskon kune kun la infanoj kaj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj en 1973 unuafoje metis siajn piedojn sur la promesitan teron... La festego estos neimagebla !

Tiu ĉi teksto atingis nin tro malfrue, sed ni trovis ĝin tiel bela, ke ni ne povis ne publikigi ĝin.

Rusio – Rublo forpuŝas Esperanto-monon –

La 11-an de decembro post multa diskutado la Centra Banko de Rusio faris decidon pri la simbolo por la nacia valuto. Baldaŭ poste en la reto disvastiĝis la informo, laŭ kiu la signo jam estas uzata kiel simbolo de la Esperanto-mono. Sed la afero estas iom pli komplika

La sovetia rublo neniam havis apartan simbolon, sed kiam post la disfalo de Sovetio disvastiĝis en Rusio la uzo de aliaj valutoj, precipe de la usona dolaro, estiĝis diskuto pri la enkonduko de aparta simbolo por la rusa monunujo.



La diskuto daŭris longe, kaj diversaj amaskomunikiloj organizis konkursojn por elpensi la plej taŭgan variaĵon. Fine, en 2006, nova leĝo donis al la Centra Banko la rajton difini simbolon por la rusa rublo, kaj en decembro 2013 la nova simbolo estis oficialigita. Tuj poste la rusa interreta pioniro kaj popularega bloganto Anton Nosik atentigis, ke la signo jam troviĝas en la unikoda tabelo kaj simbolas iaman espe-

**BOUW
EXPO
TEGELEXPO
MIX-BETON
BOUWMATERIALEN**
DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKENI
PAESEN
EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !
TEGELEXPO ☎ 011 66 55 54
BOUWEXPO ☎ 011 66 55 50

rantistan monunuon kun la nomo spesmilo.

En la blogo kun la titolo “La rusa rublo estas valuto de la esperantistoj” li rakontas, ke spesmilo estis elpensita de la franca matematikisto René de Saussure en 1907 kaj estis uzata ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de kelkaj britaj kaj svisaj bankoj antaŭ la Unua Mondmilito. Nuntempe ĝi estas uzata en la esperantlingva versio de la ludo Monopolo, li aldonas.

Lázlo Szilvási, Ret-Info, Hungario

Pollando - Ŝipkrozado en aŭtuno ka vintro -

La Internacia Klubo Esperantotur de Bydgoszcz (info@esperanto.bydgoszcz.eu aŭ andreo@rubukion.net.pl) organizis laŭvican ŝipkrozadon per la ŝipo Costa Fascinosa de la 3-a ĝis la 10-a de novembro 2013 sur la Adriatika kaj Jona Maroj de Italio al Grekio, Turkio, Kroatio kaj ree al Italio. Ĝi estis unu el la plej malmultekostaj luksaj ŝipkrozadoj sur maroj de la mondo, ĉar ĝia prezo estis nur € 229 plus fakultativaj ekskursoj. Ankaŭ la busvojaĝo de Bydgoszcz al Venecio la 2-an / 3-an de novembro kaj revene la 10-an / 11-an de novembro apartenis al la plej mallongaj (ĉ. 20 horoj) kaj la plej malmultekostaj – malpli ol € 150. La plej multaj ŝippasaĝeroj estis pensiuloj kaj familioj kun infanoj. Multaj turistoj kutime elspezas senbezzone trifoje pli multe por simila ŝipkrozado por vojaĝi somere, dum aŭtune kaj vintre eblas ricevi ŝipadabatojn de eĉ pli ol 60% kaj defendi sin kontraŭ somervarmegoj. Dum la semajna ŝipkrozado nia Esperantoturgrupo vizitis Venecion – ankaŭ la subakvigitan Placon Sankta Marko kaj la belegan urbon Bari en Italio. La sekva tago de la ŝipvojaĝo estis dediĉita al Katakolon kaj Olimpio – kie okazis

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

la unuaj Olimpiaj Ludoj en 776 a.K. Ni daŭrigis la ŝipkrozon sur la Jona Maro al Turkio – Izmir (antaŭe Smyrna), de kie ni buse vizitis la domon de Maria, la Dia patrino, kaj Efez.

Nokte ni vojaĝis al unu el la plej interesaj urboj de Eŭropo – Istambulo, kie eblis viziti kun ĉiĉerono la Bluan Moskeon, la moskeon Agia Sofia kaj la Grandan Bazaron, aŭ dum pli ol 8 horoj mem promeni tra Istambulo. Revene ni pasigis unu tagon surmare kaj poste vizitis la urbon Dubrovnik, la ĉefurbon de Dalmatio kaj historian centron de Kroatio, kiu allogas ĉiujn turistojn. La okan tagon de la ŝipkrozo ni revenis al la belega Venecio krozante inter multaj ŝipetoj, boatoj kaj gondoloj.

La programo de la ŝipkrozo estis tiel riĉa, ke apenaŭ sufiĉis tempo por abunda senlima manĝado, kaj ĉiutaga hora ĝakuzo. Ĉiun vesperon dufoje estis prezentataj artaj programoj, ne nur de elstaraj artistoj, sed ankaŭ de la 14-persona rusa baletisto, en kiu dancis kaj kantis artistoj el Rusio, Ukrainio kaj Estonio.

Dum la ŝipkrozo ne dominis la angla nek la itala lingvoj. La direktoro de la ŝipkrozo, italo, gvidis la artajn programojn samtempe en kelkaj lingvoj, kaj la ĉiutaga ŝipgazeto estis, malgraŭ sia angla nomo TODAY, eldonata en 10 lingvoj : la itala, germana, franca, hispana, portugala (estis multaj brazilanoj), angla, rusa, turka, japana kaj korea. En la ŝipanaro laboris multaj filipinoj kaj hindoj.

Bedaŭrinde tro malmultaj esperantistoj ĝis nun ŝipkrozadis, tiel ke Esperanto estas tro malofte aŭdata sur ekskursŝipegoj. Nun estas ĉirkaŭ 150 esperantoparolantoj sur ĉiu ekskursŝipego kun 2 ĝis 4 mil pasaĝeroj, tiel ke ĉiutage ĉirkaŭ duonmiliono da turistoj ŝipkrozadas sur la maroj de la mondo. Valoras do la peno ŝipkrozadi en tiuj internaciaj medioj (ĉ. 70 nacioj kiel dum Esperantokongreso)

kaj propagi Esperanton. Komence de 2014 la plej multekostaj kaj interesaj ŝipkrozadoj okazos sur Mediteraneo (07.02 - 16.02), al la Sudaj Karaiboj (22.02-08.03), Usono – Bahamoj (25.01 - 02.02), ĉirkaŭ la mondo : Japanio - Rusio - Kanado (23.05 - 30.05), kaj Kanado - Usono - Alasko (23.05 - 30.05). Detalajn informojn ni sendas laŭpete.

Andrzej Grzebowski

Sudafriko – Subteno al savado de la leonoj –

Nekredebla venko ! Sudafrika tribunalo juĝis, ke la registaro perfortis nian liberecon de opiniesprimo cenzurante niajn afiŝojn alvokantaj al la protekto de la sudafrikaj leonoj. Ni maksimumigu la premon atingante unu milionon da subskriboj kaj tiel savu la leonojn !

Centoj da leonoj estas masakrataj en Sudafriko por fari falsajn trinkaĵojn por plialtigi virecon. Ni povas devigi la sudafrican registaron fini tiun kruelan komercon premante tie kie plej dolorigas : industrio kaj turismo.

Post la tutmonda malpermeso vendi tigrajn ostojn, la ĉasistoj trovis novan trofeojn : la leonojn. Tiuj majestaj bestoj estas bredataj en teruraj cirkonstancoj kun la sola celo de ĉasado en kaĝoj, ĉar riĉaj turistoj pagas milojn da dolaroj por pafi leonon de proksime tra barilo. Laŭ la ekspertoj la ostoj de tiuj leonoj estas eksportataj al Azio, kie ĉarlatanoj kuiras trinkaĵojn, kiuj generas rekordajn profitojn. Tiu komerco estas en plena ekspansio, kaj la specialistoj timas, ke plialtigo de la prezoj kaŭzos kreskon de la ŝtelĉasado de la sovaĝaj leonoj, dum restas nun en Afriko nur 20 000 da ili.

Se ni montros al prezidento Zuma, ke tiu brutala komerco damaĝas la bildon de Sudafriko kiel turisma lando, li povos malpermesi la komercon de leonaj ostoj. Avaaz afiŝos reklamon favore al nia agado en la fughavenoj kaj la turismaj retejoj kaj magazinoj, sed ni urĝe bezonas unu milionon da subskriboj por plifortigi la influon de tiuj publikaĵoj.

Subskribu la suban peticion por kreskigi la nombron da subtenantoj : http://www.avaaz.org/fr/stop_lion_slaughter_for_sex_aides_rb/?bdBcfdb&v=30864 .

La internacia premo stimulis Ĉinion al malpermeso de la tre populara “tigrosta vino” kaj aliaj trinkaĵoj surbaze de tigraj ostoj. Ekspertoj deklaras, ke, se la sudafrika registaro ne agos tre baldaŭ, la sovaĝaj leonoj povos fariĝi la sekvanta bestospeco – post la tigroj kaj kaj la rinoceroj – kiu estos minacata de ekstermo. Sud-Afriko estas nun la plej granda eksportisto

de tiuj trofeoj. Ĝi estas ankaŭ la sola afrika lando, kie malliberaj leonoj estas amase bredataj por vivteni la turistan ĉasadon.

Kune la membroj de Avaaz en la tuta mondo mobiliziĝis por postuli pli bonan protekton de la elefantoj kaj rinoceroj, savi la abelojn de la toksaj pesticidoj, konservi vundeblajn bestospecojn, subtenante la kreadon de enormaj marrezervejoj en la arkipelago de la Chagos aŭ en Aŭstralio.

Avaaz estas monda reto kun 28 milionoj da membroj, kiu kampanjas, por ke la opinioj kaj valoroj de la popoloj influu la tutmondajn decidojn. Ni estas financataj nur per donacoj kaj ricevas neniamajn subvenciojn de registaroj aŭ entreprenoj. *La tuta teamo de Avaaz*

Nia rakonto : Malagrabla viro (2)

Ons verhaal : Een onaangename man (2)

“Ĉu vi ankoraŭ ĉiam ne kapablas fumi, Hildebrand?”

Mi rapidis al la cigarskatolon kaj ofertis al li cigaron.

“Ĉu vi ankoraŭ ĉiam havas tiun ‘pajlecan’ specon?” li demandis, formordante la pinton de la cigaro, kiun li prenis. Tiam, repreninte la temon, ĉar ĝi estis ankoraŭ nesufiĉe elĉerpita laŭ li :

“Knaboj, mi trovas tiel priridinde, ke iu ne kapablas fumi. Mi konas ankoraŭ alian viron kiu ne fumas, sed il estas la plej mizera persono en la mondo.”

Mi komprenis, ke ĉe ebla forpaso de tiu mizerulo, mi havus multan ŝancon anstataŭi lin en lia alta rango laŭ la takso de mia kuzo.

Nun sekvis konversacio, kiu precipe konsistis el kelkaj informoj pri reciprokaj konatoj, en kiu troviĝis neniu malagrabraĵo krom tio, ke li, kiam mi informiĝis pri tre intima amiko, kiun ankaŭ li bone konis, trovis necese akriĝi sian memoron per la demando “ĉu temas pri tiu, kies frato havis malpuregan aferon kun la polico?” por ke Boerhave povu suspekti tiun familion pri la plej malnoblaj faroj. Mi ne scias, ĉu li faris tion, ĉar mallonge poste li forlasis nin momenton por sendi pinĉleteron¹, kiun Nurks uzis por inciti min per la rimarko :

“Tiu amiko via tute similas al tiu ŝujudo², kiu ĉiam sidas ĉe la angulo de la Strato Kriko kaj la Heerenstraat (Strato de la Sinjoroj).”

Kaj kiam mi faris grandajn okulojn pro miro, li aldiris :

“Nu, vi ja scias: tiu malbela viro, kiu aspektas, kvazaŭ li ricevis piedfrapon de ĉevalo en la vizaĝo.”

Nu, en tiu momento Boerhave reeniris. Pri lia simileco al la judo ĉe angulo de la strato Kriko kaj la Strato de la Sinjoroj, mi ne povis juĝi, ĉar la vizaĝo de la diversaj ŝujudoj en Amsterdamo ne staris klare antaŭ mia menso. Sed estis neeble al mi vidi sur la vizaĝo de mia amiko ion kio pensigis, ke ĝi estis iam maldolĉe tuŝita de hufo de tia kvarpedulo, kiel diris la flatanta Nurks.



La okdeksep-jara Hildebrand verkante

Ni konsumis kafon kaj panon, kiuj ambaŭ havis la honoron tute plaĉi al mia kuzo. Li tamen asertis, ke estas malsanige trinki kafon sen lakto, pri kio laŭ li la medicina studento pekis, certigante, ke li povis ĉiam vidi tion je ies haŭtkoloro, ĉar la haŭtkoloro malbeliĝis. Sed kiam Boerhave diris, ke li estas medicina studento, li tuj ŝanĝis la direkton de sia argumentado, pentrante favoregan bildon de la multaj junaj kuracistoj, kiuj loĝas en Amsterdamo en multekostaj ĉambroj sen pano kaj devas fari ĉiuspecajn malnoblaĵojn por ricevi buson³ kaj pli da tiaj stimulantaj faktoj, tre taŭgaj por kuraĝigi medicinan kandidaton en liaj studoj. Kaj li finis sian argumentadon per la solena deklaro, “ke ekzistas neniu kuracisto

¹ Letero sen koverto. Oni faldis ĝin en kvar aŭ ok. Poste la esprimo signifis “sendi mesaĝon”.

² Iu kiu purigas ŝuojn, judo aŭ ne.

³ La personoj kiuj pagis kontribuon ĉiusemajne, povis senpage vojaĝi per tiu buso, kiam ili malsanis.

en la mondo, al kiu li, Roberto Nurks, konfidus eĉ nur sian katon”.

Ni iris al la arbaro. Jam estis post la unua horo. Nu, ĉiuj aferoj okazas en sia konvena momento. La najtingaloj kantas en printempo, la fringoj kaj turdoj en aŭtuno. La suno brilas dumtage, kandela dumvespere kaj la luno dumnokte. Tio validas ankaŭ por la diversaj specoj de homoj. Ĉiu konas la mil unu specojn de la harlema⁴ specio, scias ke ili ĉiuj havas sian propran diversan promenmomenton. Tio fariĝas tre kompreneble, se oni pensas pri la diversaj manĝotempoj, kaj ĉe tio konsideras, ke multaj homoj iras al la tagmeza diservo, dum multaj aliaj eĉ ne scias, ke tia diservo ekzistas. Se oni ordigas ĉiujn tiujn specojn, kaj enkalku-



las ankaŭ ĉiujn fremdajn birdojn, kiuj alflugas en sunplenaj dimanĉoj el aliaj regionoj, tiam oni ricevas sinsekvon ne malsimilan al tiu de la “kiel arbofolioj sin forpuŝantaj generacioj dum la ekzisto de la homaro”, laŭ la bela komparo de Homero, aŭ simila al la sinforpuŝantaj barbaroj en la Eŭropo de la kvina jarcento p.K.

Tiel la naturesploristo, kiu neglektas la kirkon dimanĉmatene, aŭ iris al la frua prediko (kion mi preferas supozi) kaj alvenas je la deka aŭ la deka kaj duono en la Harlema Arbaro sur la Placo aŭ ĉe la herbejo Koekamp (la nomo ne estas belsona), renkontas kelkajn festantajn ‘birdojn’ el la Harlema Kvartalo, kiuj foriris el Amsterdamo per barĝo je la sepa. La maskloj

surhavas malbelbluajn aŭ nigrajn vestaĵojn kaj havas fajne bluajn malsekegajn vangharojn. Ili estis provizitaj per longaj, goŭdaj⁵ pipoj, kiujn ili fumas kaj kies kapeton il malferme tenas inter la fingroj kun la tuboj malsupren. Rimarku la pluvumbrelojn. La femaloj estis blanke vestitaj. Ili levas siajn superveston tiel ofte, kiel ili devas paŝi trans guton de akvo, kaj portas la tuton refaldita kaj fiksita per pinglo, se vere kuŝas tie flako, restinta de la sabata pluvo. Ili daŭre manĝas el sia sako. Iuj el ili krome havas butonumitan bebovindotukon kun provianto. Oni plej ofte renkontas ilin en grupoj de naŭ : du maskloj kaj sep femaloj. Ili promenas grandan distancon, ofte ĝis Heemstede aŭ Slip, sed tagmeze ili surteriĝas ĉe la Groene Valk (Verda Falko) aŭ la Aalbessenboom (Ribujo) por manĝi kaj trinki bieron. Poste ili foriras al Amsterdamo per la lasta barĝo, dum intertempe la bebovindotuko sanĝiĝis de tornistro al korbo por hejmenporti florojn, kiuj staros tri semajnojn en tera laktopoto sen anso, en mal-granda butiketo aŭ sur la plej supera ŝtupo en kelo, ĉi tie sen lumo, kaj tie sub la freŝa spi-rado de fetoranta kloako kaj konsistigos la feliĉecon kaj riĉecon de iu kiu vendas fadenojn kaj rubandojn kaj samtempe estas perantino de laborpostenoj, aŭ de iu kiu vendas lignon kaj torfon kaj samtempe laboras eksterdome.

Se la naturesploristo promenas pluen, li vidas preterpase unue ankoraŭ tiuspecan trupon, kiu ĝuas la vidon de la Paviljono kaj kies membroj, por konvinki sin, ke ne estas sonĝo, per ambaŭ manoj tenas la stangojn de la krado, tute ne povante klarigi, kiun ĉarmon aŭ gajecon esprimas la grupo de Laokono⁶, sed konsentante pri tio, ke la W de la frontispico estas la inicialo de Willem.

La plurfoje menciita naturesploristo momenton forlasas la Dreef (Aleon) por partopreni en la ravo de tiuj fremduloj, sed nun paŝas al la gastejoj tra tre ĉarma aleeto, en kiu la matensuno tre gaje ludas tra la altaj arboj. Li promenas preter flavan *barouchette*⁷ kaj blua *char-à-bancs*⁸, kiujn li vidas maljungitaj sub la arboj, kvazaŭ por allogi aliajn similajn veturilojn. Ĉi tie ĉio estas ankoraŭ tombe silenta. Estas tre ĉarma mateno. Unu sola sinjoro kun griza

⁴ Harlema (Haarlem), ĉefurbo de la provinco Nord-Holando

⁵ Faritaj en la urbo Goŭda

⁶ Fama malnovgreka statuo prezentanta la sacerdoton Laokonon kun siaj du filoj, atakatajn de du serpentegoj. Ĉar li avertis la trojanojn kontraŭ la dan-

ĝero, kiun estis signifonta por Trojo la ligna ĉevalo de la aĥajoj, la diino Atena sendis tiujn bestojn, kiuj mortigis ilin.

⁷ Franca vorto: speco de kvarrada veturilo

⁸ Franca vorto: speco de veturilo kun pluraj benkoj

ĉevalhara ĉapelo el Saksio-Vejmaro, en bruna frako kaj griza somerpantalono, anglaj punktitaj ŝtrumpetoj, malaltaj ŝuoj kaj kun svelta, bontona eksteraĵo, sidas ĉe unu el la marmor-aspektaj lignaj tabletoj de la gastejo *Amsterdams Wapen* (Amsterdama Blazono) antaŭ la pordo, tre trankvile legante libron. Sufiĉe dika sinjoro kun ruĝaj vangoj kaj kolerika aspekto en nigra frako kaj kuloto, falinte sur ŝegon kaj apogante sin sur sian bastonon, sen tableto, legas gazeton. Juna virino, nur antaŭnelonge forlasinte la naskoliton kaj ankoraŭ iomete pala, komforte sidas ĉe alia tableto, sur kiu staras uzita matenmanĝa manĝilaro. Ŝi surhavas helbluan robon kaj ĉarman zejstan⁹ kufon kun helblua rubandeto kaj trikas. De tempo al tempo ŝi rigardas la vartistinon, kiu kun amsterdama korneto¹⁰ sur la kapo, aŭ pli precize malantaŭ la kapo – ĉar tiu speco de kufo lasas malkovrita la hararon ĝis la verto –, en roze-ruĝa robeto kun nigra antaŭtuko kaj punktoj sur la everlastingaj¹¹ ŝuoj kun kruciĝantaj rubandoj, tute kiel ŝia sinjorino, trankvile paŝetis sur la transa flanko de la vojo kun ĉe unu gantita mano dujara infano kun balena ŝirmkufeto kaj rozkoloraj bantetoj, kaj ĉe la alia mano trijara infano en rektigiletoj¹². Ĉiufoje kiam ŝi renkontis iun, ŝi alparolis la infanojn, volante doni bonan impreson pri sia eduko kaj sia servo, per la solena ‘vi’ anstataŭ la kutima ‘ci’.

“Ĉu vi ne salutas la sinjoron, Ŝorŝetje?” aŭ “Fi, Fransŭatje, kial vi malpurigas viajn manojn per tiuj konketoj?”

Ĉe la Hertebaar (vojo de la Cervoj) ie kaj tie montras sin nudkapaj fraŭlinoj en kostumoj, kiujn ili nomas ‘tute kamparecaj’, kaj kiuj estas karakterizitaj ĉefe per forte senkolorigitaj silkaj antaŭtukoj, kaj donas nutraĵon al la tieaj amindaj bestoj. Tiuj estas la feliĉulinoj, kiuj loĝas ĉe Stoffels, la proprietulo de la *Amsterdamse Wapen*. En la *Sociëteit* estas ankoraŭ neniuj, sed paro da servistoj, plenkreskulo kaj junulo, kiu neniam adoltos, staras unu kontraŭ la alia en la kadro de la meza vitropordo kun la manoj sur la dorso, admirante la talenton de Zoher¹³, kiu ebligis al la sinjoroj de “Fideleco devas montriĝi” vidi la ŝipojn, kiuj veturas sur la kanalo Sparen. *Hildebrand (daŭrigota)*

⁹ Zeist, urbo en Nord-Hollando. La virinoj de Zeist surhavis specialan modelon de kufo. Edziniĝintaj virino portis helbluan rubandon, la needziniĝintaj rozkolorajn kaj la vidvinojn blankajn.

¹⁰ Blanka kufo kun faldita rando, kiun surhavis la

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

En novembro kaj decembro 2013

Ĵaŭdon, la 28-an de novembro :

Sep esperantistoj venis al la lokalo Perebak 3 en la Kulturcentro de Peer kaj atente aŭskultis la klarigojn de Rob Ketelaer el Nederlando pri sia studo pri la proskimume 2650 proverbojn de D-ro Zamenhof, kiujn li ordigis laŭteme kaj provizis per klariĝoj kaj samtemaj parencaj proverboj.

Ĵaŭdon, la 12-an de decembro :

Dek du geesperantistoj kunvenis je la 19h30 en la Peera restoracio “De Boskar”

por festi la naskiĝtagrevenon de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreanto de Esperanto, kiu naskiĝis la 15-an de decembro 1859. Ĉiu mendis, manĝis, trinkis kaj pagis manĝaĵon kaj trinkaĵon laŭ sia propra gusto. Dum la manĝo ili vigle interparolis en la nederlanda, sed ankaŭ en Esperanto pro la ĉeesto de eksterlandano : Ĥate, la edzino de Ben Indestege, kiu naskiĝis en Ukrainio.

Aktivaĵoj en januaro kaj februaro 2014

Ĵaŭdon, la 30-an de januaro :

Pieter Jan Doumen, prelegos pri la malkovro de la Arkeo de Noa sur la monto Ararato far rusaj pilotoj en 1917 fine de la regno de imperiestro Nikolao II-a.

Ĵaŭdon, la 27-an de februaro :

Henri Schutters gvidos kvizon pri ĝeneralaj temoj – do ne nur pri Esperanto kaj ĝia kreanto, D-ro Zamenhof.

Ĉiuj esperantistoj estas tutkore bonvenaj al niaj kunvenoj en lokalo de la Kultura Centro de Peer, Zuidervest 2A, kiu troviĝas fronte al la preĝejo.

edzinoj de la predikistoj

¹¹ Speco de anglaj lana ŝtofo por jakoj kaj ŝuoj

¹² Stangoj por plifortigi ĝiajn kruretojn

¹³ Konata tiutempa ĝardenarkitekto (+ 1870)

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (8) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperanto-lando:
- Aŭstrio : Dua libro pri elektromagneta indukto (*Szilvási Lázlo*)
- Japanio : Etsuo Miyoshi ricevas ordenon (*El la Balta Ondo*)
- Paĝo 5
- Brazilo : Bona Espero invitas vin
- Pollando : Ŝipkruzado en aŭtuno kaj vintro (*Andrzej Grzebowski*)
- Paĝo 7 : - Sud-Afriko: Subteno al salvado de la leonoj (*La teamo de Avaaz*)
- Paĝo 8 : Nia rakonto: Malagrabla viro (2) (*Hildebrand*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (LEA) 2013-2014
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatica heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.